


The British Esperantist

n^o 679 · may 1962

one shilling

Plus postage



(Fotis: M. Boulton)

Sinjoro Andreo Cseh (Ĉe), eltrovinto de la famekonata rektmetoda instruo de Esperanto, kaj majstro de tuta generacio da Esperantistaj instruantoj.
(p. 249)

The British Esperantist

Publishers:

THE BRITISH ESPERANTO
ASSOCIATION, INC.
140, Holland Park Ave.,
London, W.11

Editor:

D. B. GREGOR, M.A., L.B.E.A.
27, Rushmere Road
Northampton

Contributions must be type-written, in double spacing, and sent in by the 20th of the month previous to publication. The Editor reserves the right to refuse, correct, or shorten them. He is not necessarily in agreement with views expressed in signed articles, but accepts responsibility for those unsigned. Advertisements: £5 per page and pro rata to one-eighth.

CONTENTS

	<i>page</i>
La 46a Brita Kongreso	249
From Far and Near	251
El la arĥivo de BEA	253
Esperanto en Radio	253
Fajrujoj de Esperanto— XVII. 172 Riouwstraat, den Haag	
<i>M. Boulton</i>	254
Lingva Angulo	255
El nia Leterkesto	256
Translation Competition 32	257
La 47a UK	257
Poezia Angulo. <i>Diccon Masterman</i>	257
Junularo Esperantista Brita	258
Nekrologo	259
Mortoj	259
Okazontaĵoj	259
Krucvortenigma Solvo. <i>A. D. Cook</i>	259
Official Notices	260

FOR YOUTH

POR LA JUNULARO

THE MODERN ESPERANTO CORRESPONDENCE COURSE

including textbook and vocabulary

Designed and produced primarily for members of the Youth Section of the BEA (Junularo Esperantista Brita) but available also for non-members under the age of 21 years.

Special fee only TEN SHILLINGS

For further details and application form
send stamp to

BEA, 140 Holland Park Avenue, London W.11

The British Esperantist

(incorporating International Language)

THE OFFICIAL ORGAN OF THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION

58TH YEAR, No. 679

MAY, 1962

La 46a BRITA KONGRESO DE ESPERANTO

Jam jaŭdon vespere la verdstela flago flirtis alte sur la supro de la Urbdomo, la Kongresejo; kaj jam ĉe sia alveno en Southport la Prezidentino trovis en sia hotelĉambro belegan florbukedon, senditan nome de la Urbestro kaj lia Konsilantaro. Unu el la ĉeftraĵoj de la Kongreso estis ja la daŭra klopodado de la urba instanco, por ke la Kongreso sukcesu kaj lasu ĉe la kongresanoj agrablan memoron pri la kongresa urbo: celo, kiun ili plene atingis.

Post la **Interkonigo**, efektivigita jam en pluraj hoteloj antaŭ ol ni kunvenis vespere ĉe la bufedo en la kongresejo, la Prezidanto de BEA, anstataŭante la Prezidanton de LKK, S-ron Eldon, tre bedaŭrinde malsanan, formale malfermis la Kongreson. Sekvis **Gaja Vespero**, kun skeĉoj kaj muziko de la podio. Sabatun matene la Urbestro bonvenigis la kongresanojn, komencante per frazo en Esperanto (citita poste en loka ĵurnalo). Ĉe la sekvanta **Libera Forumo** oni diskutis Kongresajn Karavanojn (tiu por Sofio en 1963 estu ekaranĝita jam nun), la "**BE**" (io drasta estas farennda por malpliigi preskostojn), *atalita* (iel la disputado devus ĉesi), kaj la uzadon de Esperanto ĉe kunvenoj de la Asocio (ĝi estas dezirinda sed ne povas esti deviga).

Posttagmeze okazis diversaj fak-kunvenoj, kaj S-ro "Dovra Soleo" respondis en klara kaj interesa maniero al demandoj pri sia longe revata Civito. Ŝajne neniel lacaj pro la volumeno da vortoj aŭditaj, la kongresanoj poste aŭskultis paroladon de S-ro D. B. Gregor pri "Esperanto en la Polemiko".

Klariginte kiel ĝi fontas el amo al la Vero, t.e. al la venko de Esperanto, kaj kontribuis al la muskoligo de la prozo, li avertis kontraŭ la danĝero de troa disputado pri lingvaj demandoj, kvazaŭ Esperanto ne havus Fundamenton kaj Akademion starigitan ĝuste por garantii la kontinuecon de la Zamenhofs tradicio kaj konservi la unuecon de la lingvo.

Vespere ĉ. 120 membroj vidis filmojn prezentatajn de S-ro N. Williams pri "La kaptita rivero" (Kariba), Southport, kaj du el la eksterlandaj vojaĝoj faritaj de liaj lernantoj el Denton.

Vekiĝante dimanĉe oni trovis, ke la printempo finfine komenciĝis per sennuba ĉielo kaj senventeco. La kongresanoj tamen ne lasis sin delogi, sed disciplinite kolektiĝis en la Salono por la **Jarkunveno** (p. 250). La postan **Tagmanĝon** en apuda restoracio karakterizis la kutima etoso de gaja senĝeno; post kio S-ro N. Smith kaj F-ino Wheatley improvize alparolis la manĝintojn per vortoj konvenaj al siaj interŝanĝitaj roloj. En la posttagmeza

Diservo Pastro K. Twinn predikis interese pri "La universala bezono al Religio", S-ro R. E. Morton orgenludis en memorinda maniero (aparte ĉe "La Espero"), kaj de la ĉ. 120 ĉeestantoj kolektiĝis £9 10s. por la Blindula Kaso. Konsilantara Kunsido kaj la daŭrigo de la Jarkunveno konkludis la laboron de la tago.

Je la oka vespere, tamen, komencis labori niaj distrantoj ĉe la **Kultura Vespero**. Pianludis S-roj Collis kaj Wells (ĉi lasta unu fojon akompanate de la edzino per la violono); kantis S-ino Revill kaj F-ino Larrad; deklamis F-inoj Revill kaj Acton. Inter eroj okazis ludo de "Dudek Demandoj", en kiu S-roj N. R. Smith kaj H. Tonkin kaj F-ino M. Boulton (licencio-kandidatino) venkis per unu poento S-rojn W. Gething, N. Williams, kaj D. B. Gregor (licenciaton). (Demandestro: S-ro A. Diaz.)

London, ekskurso-tagon, sub daŭre sennuba ĉielo, du aŭtoĉaroj portis okdekon da kongresanoj al Speke Hall, la Katedralo de Liverpool, kaj tra la Mersey-tunelon. Notinde bona estis la kvalito de la oficialaj gvidistoj kaj la akurateco de la Esp-istoj ĉe foriro kaj reveno. Reveninte frue, oni havis tempon por iom ripozi kaj prepari sin por la **Balo**. Tie la Urbestro regalis la kongresanojn kaj invitis kelkajn el ili al ĉetabla refreŝigado en aparta ĉambreto. Poste li restis ĝis la fino, dancante kaj surprizante per la enkonduko de kabaredaj geakrobatoj. La membroj varme aplaŭdis la merititan dank-esprimon de la Prezidantino. Je la 10.30 la Balo, kaj kun ĝi la Kongreso, finiĝis.

La LKK povas fieri pri sukces-kronitaj laboroj. Al ĝia Prezidanto, kies rapidan resaniĝon ni ĉiuj deziras, al la Sekretario, S-ro J. Steele, ĉiam afable aktiva antaŭ kaj malantaŭ la kulisoj, al liaj kunlaborantoj

inkluzive lian edzinon, al Ges-roj Parker, dejorantaj ĉe la libro-budo (kaj enspezantaj pli ol £50), la 170 kongresanoj sincere dankas kaj gratulas.

D.B.G.

Jarkunveno

La 58-a Jarkunveno de la BEA okazis en la Cambridge Hall, Southport, dimanĉon la 22-an de Aprilo, komencante je la 9.45 matene. Krom la Prezidanto, S-ro N. R. Smith, kaj oficistoj, ĉirkaŭ 100 membroj ĉeestis.

Antaŭ la formala parto de la kunsido la Prezidanto laŭtlegis raporton, kies kerno estis jam donita al la gazetaro, pri la lastatempaj atingajoj de la Esperanta Movado. La Jarraporto kaj Jarbilanco estis prezentitaj, kaj la koncernaj oficistoj respondis al demandoj pri ili.

La Prezidanto kaj oficistoj por la jaro 1962, kaj la Konsilantoj por 1962-65 estis deklaritaj, laŭ la kandidatigoj anoncitaj en "BE" de Marto, elektitaj. S-ro N. R. Smith, elektite honorofica Kasisto, klarigis ke, akceptinte postenon eksterlande, li ne povos plenumi la devojn de tiu ofico kaj tial proponis sian eksigon. Oni anoncis, ke la Konsilantaro nomos S-ron R. A. Clark honorofica Kasisto por 1962. Tiam la Prezidanto invitis la Prezidantinon-elektitan, F-inon E. M. Wheatley, veni sur la podion, kaj gratulis la Asocion pro tio, ke ĝi ekhavis ŝin kiel la novan Prezidanton.

La Prezidanto poste memorigis pri la dekjara servado de S-ro J. W. Leslie, Sekretario de la Asocio, kaj de S-ino Leslie, kaj prezentis al S-ro Leslie ĉekon, alkontribuitan de iliaj multaj amikoj en la Asocio kiel signon de dankemo.

S-ro H. Tonkin raportis pri la laboro de la Brita Junularo (JEB)

dum la pasinta jaro. La Prezidanto prezentis atestilojn al kandidatoj sukcesintaj en la mezgrada ekzameno de la Asocio, kaj anoncis, ke la proksima Brita Kongreso okazos en Hastings je Pentekosto 1963.

Rezolucioj estis akceptitaj, per kiuj la Konsilantaro devas starigi du esplor-komitatojn, unu pri la estonteco de la gazeto, la alian pri tio,

ĉu estas dezirinde fiksi specialan kotizon por geedzoj-membroj de la Asocio.

S-ro Fletcher (Nottingham) anoncis, ke nia membro, S-ro S. P. Hill, estas elektita Urbestro de Nottingham, kaj proponis, ke la Asocio sendu al li gratulan telegramon; kion oni akklame akceptis.

C. M. Houghton.

FROM FAR AND NEAR *

Home

Eastern Federation: Sixty attended the AGM in Chingford on 24th March, when Mr. D. Murphy was elected President. Mr. J. W. Leslie spoke on the Parliamentary motion about a "common language", Mr. and Mrs. H. Holmes on the Warsaw Congress, and Academician Faulhaber from Amsterdam on some amusing experiences.

Yorkshire Federation: Fifty attended the AGM in Leeds on 24th March, when Mr. E. P. Crabtree was elected President and Mr. Holden Secretary (Mr. B. B. Beaumont having retired from the secretaryship after 25 years' service).

Balham: At a meeting arranged by Mr. Michael Hughes-Young, M.C. and M.P. for Wandsworth Central, in the Balham and Tooting Chamber of Commerce on 23rd March, Mr. F. Thurgood spoke as the representative of Esperanto and answered many questions in the presence of the press.

Esperanto in the press: The *Dublin Evening Herald* and the *Dublin Evening Mail* published in April a letter from Mr. R. Markarian on Esperanto as a school-subject. The report of a 30-minute tape-recording made by Esperantist pupils of Mr. Markarian's school for the Dutch radio-programme "Circle round the World" was printed in two local

papers, and on 4th April the BBC Home Service reported the fact in its news service. On the same day, his question, "What language was invented by the Polish Dr. Zamenhof?", was correctly answered in the programme "Pit Your Wits". Two out of five pupils (John Evans and Brian Aves) have passed the BEA Oral Examination for schools.

In *The Freethinker* of 30th March, Mr. M. Garnett corrects the foolish assertions of a previous correspondent. The *Observer* of 18th March carried an article reporting Esperanto's new status *vis-à-vis* Unesco (which confers the right to subsidy for publishing certain books and holding conferences), and the efforts being made to secure the introduction of the language into schools. Poland, Denmark, Greece, and Jugoslavia have agreed in principle to introduce it on a reciprocal basis, whereby, if the scheme were approved, each of the four countries would teach the language to the children of fifty schools, students at one university, and trainee teachers at one college.

* Por malpliigi preskoston, ni estas devigitaj limigi malgrandajn litertipojn al nur du paĝoj. Pro tio malpli da spaco estas disponebla por ĉi tiu kaj aliaj rubrikaj. Koncize do farigas maksimuma virto: ni igu dek vortojn fari la laboron de dudek—ion kio, laŭ la instruistoj, estas bona por la stilo.

Holland, Brazil, and New Zealand are interested in the idea. In a leading article in the *Guardian* of 21st April the following sentence appeared: "English is used by all (radio-stations for propaganda), French by 48, Arabic by 39, Esperanto by 5, even Yiddish by 3." The figure is in fact 8 (see programmes on p. 253); but the significance of the sentence is the inclusion of Esperanto, without explanatory phrase, among other languages, as though its use were a thoroughly normal thing. Thus used in radio on a world-wide scale, Esperanto has already, in a sense, "arrived". It may not be the "fina venko", but a victory it is.

International Christian Esperanto

League: The British Section held its ninth AGM in Southport on 21st April, twenty-six attending under the chairmanship of Mr. Norman Williams, in the absence of President A. J. Hicks. The proceedings began and ended with a hymn, assisted by a tape-recorded "choir"; and after formal business, members listened with pleasure and profit to a short sermon by KELI President, Rev. Adolf Burkhardt of Germany, on a tape lent by Mr. Steele. The Annual Report was in three parts: 1. *General* (membership now 95); 2. *Congress* (account of the highly successful Golden Jubilee Congress at Bishop's Stortford); 3. *Financial* (satisfactory annual accounts). All officers were re-elected: Pres., Mr. A. J. Hicks; Hon. Pres., Mr. M. C. Butler and Prof. W. J. Downes; Sec.-Treas., Mr. F. D. Murphy (7 Constable Road, Ipswich); Delegate Councillor, Mrs. F. W. White; Editor, *Kristana Alvoko*, Prof. W. J. Downes. KELI is proud that once again one of their members, this time Miss E. M. Wheatley, has been elected President of BEA.

Abroad

Germany: The 105-page brochure, "Esperanto en Komerco", referred to in "BE" of April, p. 237, has appeared. It costs 1.50 GM and can be ordered from: Esperanto-Rondo, Crailsheim, Germany.

Holland: The famous firm of Philips will shortly publish a splendid, illustrated catalogue of its medicinal instruments in Esperanto. The Director of the firm's medicinal department, Mr. Wensing, spoke at the official opening of the new Central Office of the Universal Esp. Association in Rotterdam in April—a ceremony at which the Association's General Secretary, Dr. Ivo Lapenna, stressed the ever-increasing actuality of the language-problem and Esperanto's readiness to provide the solution.

Denmark: The Central Danish Esp-ist League (CDEL) has just issued a stick-on notice, "Esperanto estas parolata", for use in shop-windows. They are obtainable (five for 6d., post free) from S-ro Søren Christensen, Frederik den VII's vej 26, Kolding, Denmark.

France: "Esperanto-Parolata" is also the title of an Address-list of firms and other undertakings where clients can be attended to in Esperanto. The 1961 supplement contains 115 addresses from 21 countries. Of these, 14 are Hotels or Pensions in eight countries. The list can be obtained for 1.80 NF (5 steloj) from: S-ro M. Rétot, 162 Bulvarde A. Briand, Montreuil (Seine). Hotels, restaurants, shops, information-offices wishing to appear in the 1963 supplement can do so gratis; other firms pay a nominal sum.

Italy: The *Annuario Alberghi d'Italia* (Hotels' Yearbook) for 1961 has explanations in six languages including Esperanto.

EL LA ARĤIVO DE B.E.A.

Krom la korespondajoj de Zamenhof mem, ĵus de ni publikigitaj, troviĝas ĉe nia Biblioteko leteroj kaj poŝtkartoj de membroj de lia familio. Jen du el la ses dokumentoj:—

1. P.k. de Aleksander Zamenhof, al Ges-roj Moscheles, Elleray, Windermere.

Londono,

la 25-an de Aŭgusto, 1914.

Estimataj Gesinjoroj !

Antaŭ kelkaj tagoj mi alvenis Anglujon (Londonon) por trapasi Norvegujon, Svedujon, Finlandon, esperante tiamaniere atingi Varsovion. Mia frato Ludviko, laŭ la letero de Generalo Sebert, troviĝas jam en Varsovio—do mi estas pri li kvieta. Mi persone, kvankam absolute ne konas (*tiel !*) anglan lingvon, dank' al afableco kaj sindonemeco de amindaj Londonaj esperantistoj, pasigis ĉi tie feliĉajn, neforgeseblajn tagojn. Mi nur bedaŭras, ke mi ne havis feliĉon ankaŭ vidi Vin, estimataj Gesinjoroj, kaj premi Vian manon. Mi esperas, ke vi fartas tute bone kaj, troviĝante malproksime de centro de milito, ne tiel suferas pro la terurega okazintaĵo. Sendante al Vi miajn tutkorajn sincerajn salutojn, mi restas

plenrespekte Via

A. Zamenhof.

Notoj: La plej juna frato de Z., Aleksander, "mortis kiel kolonelo de la rusa armeo en 1916" (*Encikl.*). Laŭ M. Boulton (*Zamenhof*, p. 198) temis pri sinmortigo prefere ol verŝi homan sangon. La sciigo pri lia morto, atinginta Z. nur en Aprilo 1917, pligravigis lian sanstaton. Dum sia restado en Londono A. publikigis en "*BE*" elĉerpajojn el sia taglibro rilate la rus-japanan militon, kie liaj travivaĵoj faris lin konscienca kontraŭmilitisto. (*Verk. cit.*, p. 190.)

2. P.k. de Leon Zamenhof, al S-ro E. Osmond, 95 Fowlers Walk, Ealing.

Varsovio 11/1.32

Tre estimata Samideano !

Plej koran dankon por Via afabla memoro kaj tutkorajn salutojn okaze de la nova jaro. Mi estas vere kortuŝita pro Via afableco. La eltranĉaĵoj el la gazetaro estas efektive tre interesaj, kvankam mi persone speciale pri tiu ĉi temo ne estas interesata. Mi ilin transdonis al la Varsoviaj porhebreaj gazetoj kaj ili elprofitos ilin.

Ĉiam preta al reciproka servo

Via

L. Zamenhof.

Notoj: Alia frato de Z., Leono estis konata kiel Esperanta verkisto. Du jarojn post ĉi tiu poŝtkarto li mortis en Varsovio.

ESPERANTO EN RADIO

(Ĉiuj horoj B.S.T.)

Radio Varsovio (249 m., 42.11 m., 41.99 m., 41.12 m., 31.50 m., 31.43 m., 31.01 m., 25.28 m., 25.42 m.): ĉiutage je 16.30.

Radio Bern: lunde kaj merkrede je 13.20, jaŭde kaj sabate je 22.15. Ondoj: 48.66 m., 31.46 m., plus tagmeze 13.94 m. kaj vespere 26.61 m.

Hilversum (402 m. aŭ 298 m.): vendrede je 23.00.

Radio Roma (50.34 m., 41.24 m., 30.90 m.): marde, merkrede, vendrede je 18.55.

Zagreb (264.7 m.): jaŭde je 23.05.

Vienna (513 m., 293 m., 48 m., 41 m., 30 m., 25 m., 16 m., 11 m.), marde je 17.40.

Sofia: dimanĉe je 20.00 (48.62 m. kaj 39.11 m.) kaj je 23.30 (30.93 m. kaj 25.32 m.).

Prague: ĉiun lastan jaŭdon je 6.45 ptm. sur ondo 233.3 m.

Se, kiel dirite sur p. 252, en la kampo de la Radio Esp. jam venkis, estas pli ol iam necese, ke ni ne perdu gajnitan pozicion per forgeso skribi al la stacioj por danki, gratuli, informi, instigi, kaj ĉiel montri nian interesigon.

FAJRUJOJ DE ESPERANTO

XVII. 172 RIOUWSTRAAT, DEN HAAG

La ekstera pordo mem, kun sia granda, radiantanta verda stelo, tuj indikas, ke ni estas en Esperantujo. Ni supreniru: kaj ni trovos la ĉefsideojn de la Esperanto-Instituto, kie Andreo Cseh alcentrigas sian instruon, instruistinstruan laboron, kaj tiun de Universala Ligo, la mondfederalisma movado, kiu uzas Esperanton kaj kies gazeto, *La Praktiko*, estas kaj mondfederalisma gazeto kaj tre valora edukilo por la serioza esperantisto. Tie bonvenigis min Andreo Cseh, kies infekta rideto kaj elokventaj manoj estas jam konataj al centoj da Cseh-kursanoj kaj Cseh-instruistoj, kaj S-ino Julia Isbrucker, serena en sia reĝineca, arĝentkrona beleco.

Iam 172 Riouwstraat estis esperantujo de la tegmento ĝis la fundamento. Antaŭ la dua mondmilito, Andreo Cseh, kiel bonvolema verda araneo, sidis ĉe la centro de sia reto de pli ol 460 Cseh-instruistoj. Inter ili troviĝis Lidja Zamenhof, Julio Baghy, Tiberio Morariu, Sigismundo Pragano. Sed naziismo kaj faŝismo estas la ekzaktaj maloj de esperantismo, kaj ne estas mirinde, ke dum la dua mondmilito la nazioj rabis en la senkulpaj ĉambroj de 172 Riouwstraat. Ili forportis la riĉan stokon; kaj nun nur parto de la domo estas dediĉita al Esperanto: sed tiu parto estas vera fajrujo, kaj defias la kruelan pasintecon per sia vasta librostoko.

Mi trovis Andreon Cseh inter libroj, gazetoj, paperoj. Pakajoj atendis, ke iu portu ilin al la poŝtoficejo, aŭ malpaku ilin. Sliparoj, kestoj, telefono, multaj bretoj kun libroj, gazetoj kaj esperantaĵoj diversaj; granda portreto de Zamenhof sur la muro, kaj verda stelego el vitro. Dum

mi ĉirkaŭrigardis, du polaj samideanoj venis pilgrime, lumiĝis pro entuziasmo, kun kortuŝa admiro rigardis la librobretojn, la esperantistajn relikvojn, kaj la du mildaspektajn, nevenkeblajn homojn, kiuj tiel persiste strebadis por altaj celoj.

Universala Ligo jam montras al la mondo raciajn solvojn por diversaj problemoj. Dum longa tempo ni konis la paperajn *stelojn*, kiuj, almenaŭ pri malgrandaj aferoj, ofte helpas esperantistojn el tiuj embarasoj, kiujn registaroj ĝojas krei por ordinaraĵoj. Nun oni fabrikas metalajn monerojn. Kiel belaj ili estas! Naciaj moneroj tro ofte portas simbolojn de ŝovinismo aŭ de potenco; sed tiuj stel-moneroj portas simbolojn de supernaciaj, internaciaj, homaranismaj celoj. Multaj vizagoj de kanajloj, sadistoj, konkerintoj, aperis sur moneroj; sed sur la dekstela monero milde brilas la modestaj trajtoj de L. L. Zamenhof, apostolo de malkrueleco, maltiraneco.

Multrilate Universala Ligo, kiu celas formi "kvazaŭ novan popolon, novan nacion, kies anoj estas kunligitaj de komuna lingvo, komunaj idealoj kaj komuna kulturo", ja kiel la publikigitaj organizaĵaj principoj deklaras, "servas kiel modelo kaj efektiva kerno de la unuiginta tut-homaro de la estonteco." La ĉefsideo de UL ne nur montras ĉiujn indikojn de sistema, sindediĉa, inteligenta laboro, sed ankaŭ difuzas noblajn—kaj realajn, praktikajn—idealajn al ĉiu mondoparto. Multaj artikoloj en *La Praktiko* temas pri edukado por pli tolerema kaj racia mondo; multaj priskribas interesajn atingojn de la pasinteco aŭ la nuno, kaj tiel altigas nian homan memfidon, kontribuas al pli universala kulturo. En la

organizaĵo mem oni vidas multan demokratecon, toleremon kaj liberecon.

Admirinda estas io, kion oni povus nomi la pedagogia tekniko de Universala Ligo; tre verŝajne tio ĉi rilatas al la instruista genio de Andreo Cseh. Same kiel, en la Cseh-Kurso, bestoj, ŝercoj kaj surprizoj ludas grandan rolon, stimolante la atenton de lernantoj, pensadon kaj rezonadon, tiel en Universala Ligo utilaj simboloj atentigas pri diversaj konceptoj, kiuj alie estus tro abstraktaj kaj palaj. La stelo-mono estas eble la plej interesa elpensajo; sed aliaj interesaj simboloj estas la "briktoj" (kiuj bilde montras la utilecon de mondonacoj por konstrui); la bela insigno kiu memorigas nin, ke verda stelo devas radii, brili; la sloganoj, kiuj celas, ne anstataŭi racian pensadon, sed stimuli ĝin; eĉ la vort-konkursoj en *La Praktiko* rajtas esti konsiderataj kiel instruaj ludoj.

La riskoj en ĉiuj esperantaj simboloj, sloganoj, organizaj principoj estas tiuj, kiuj konstante minacas idealismajn movadojn: la risiko fali en ian senfruktan sektismon; aŭ la danĝero, pli insida, ke oni impresos al eksteruloj kiel sektisma movado. Sed mi ne timas tian sorton por Universala Ligo: ĝia esenca realismo protektos ĝin. Signifa estas la titolo de la gazeto: *La Praktiko*. Kaj kelkaj el ĝiaj gvidantoj estas jam respektataj en la ĝenerala mondfederalisma movado, en la ĝenerala mondo de klerigo kaj kulturo.

Julia Isbrucker veturigis min al mia hotelo. En la aŭtomobilo, mi rigardis tiun serenan profilon, tiel multe ĉizitan per la komplika laborplena vivo, tiel majeste trankvilan pro pacienca fido kaj firmaj principoj. Mi rerigardis al la stelkronita pordo de tiu laborejo. Jes: la tasko de veraj verdaj steloj estas—brili.

Marjorie Boulton.

Lingva Angulo

Instruistoj estas perpleksaj, kaj ne senkaŭze: kion ili instruu pri la *ata/ita* problemoj? Respondo: nenion; ili eĉ ne aludu ĝin, sed tutsimple daŭrigu kiel antaŭe, instruante la participojn laŭ tio kiel Zamenhof kaj la fondintoj de la Esperanta stilo uzis ilin, nome:

1. *He was caught*—li estis kaptita. (Klarigu, ke la koincido kun la Pluskvamperfekto (*he had been caught*) kaŭzas en la praktiko nenian malfacilaĵon. (Iuj el ni uzis Esperanton 40 jarojn eĉ ne rimarkante la koincidon!).

2. Oni uzu *-ata* jene: (a) por *being captured*; ekz. *li estis kaptata* (kiam io okazis por malhelpi tion). (b) por ripetado; ekz. *post ĉiu ŝtelado li estis kaptata*. (c) por daŭro: ĉi tio koncernas ĉefe malgrandan grupon da verboj, neligeblaj kun momenta ago, ekz. *ami, scii, koni, senti, memori*. (Progresintojn oni povus atentigi, ke dum *it was remembered* estas *ĝi estis memorata*, *it was forgotten* estas *ĝi estis forgesita*: se oni komprenas la kialon de tio, tiam oni faris grandan paŝon antaŭen, ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en la lingvistiko ĝenerale— alia pruvo pri la instruaj eblecoj de Esperanto).

3. Aldonu, ke (b) and (c) rilatas ankaŭ al *-ata* post la aliaj partoj de *esti* ("BE" de Julio-Aŭg., 1961, p. 111).

4. Menciui, ke ofte estas pli elegante uzi *Oni* aŭ eĉ *-iĝ-*.

Pli koncize enkapsuligi la aferon ol ĉi tiel mi ne kapablas.

Piednoto:—En la Nekrologo pri nia tiel kruele el la vivo forŝirita kolego, J. Hartley (p. 259), S-ro J. Cresswell skribas en la sama frazo *uzata* kaj *rifuzita*. Se vi ne povas klarigi al vi, kial tio estas korekta, renversu la paĝon kaj legu sube.

D.B.G.

Car multe implicas daŭron an ripetadon, kaj mentiam implicas momentan agon.

El nia Leterkesto

Estimata Redaktoro,—En tempoj pasintaj oni tute senhonte propagandis Esperanton. Nun, tamen, ŝajnas ke iu aŭtoritato dekretis ke “propagando” estas maldeca vorto. Anstataŭ ĝi kelkaj rekomendas “informo” kvankam laŭ uzado kaj laŭ la vortlibroj la signifoj de la du vortoj estas tute apartaj. Nu, kelkaj el niaj grupoj elektis personojn, kies speciala tasko estas aŭ p—, aŭ informado (malnova, vortlibra signifo), aŭ ambaŭ.

Sed leteroj de grupoj al la oficejo de BEA montras tre diversajn respondojn al la demando; kiel oni nomu tiujn elektitajn personojn. La Grupo en Leeds havas publikiston. La grupo en Bristol havas publicistan sekretarion. La Londona Klubo havas informsekretarion. Eble en aliaj lokoj oni elpensis pluajn nomojn. Por eviti novan lingvan skismon, ĉu ne estus bone, ke la grupoj interkonsentu pri ioma unuformeco? El la suprecititaj titoloj neniu, laŭ ĝia vortlibraj klarigoj, ŝajnas respondi ĝuste al la tasko de la portanto. Sed la esperanta vorttrezoro estas sufiĉe riĉa, ke ĝi povas provizi nomojn kun precizaj signifoj kaj ne kun la sola merito, ke ili imitas nacilingvajn formojn. Ekzemple: diskonigisto kaj varbsekretario. Ĉu ne bona temo por diskuto dum “lingvistikaj vesperoj”, kiam oni enuiĝis je at-itado?

Sincere via, *C. M. Houghton.*

Estimata Redaktoro, — En nia lando oni nun urĝe preparas libron pri la rusa poeto-esperantisto Vasilij Eroŝenko. Mi tion helpas, tradukante liajn verkojn kaj kolektante la materialon pri liaj verkoj, socia agado, privata vivo, ktp.

Oni diras, ke dum lia restado en Londono li sukcesis tie eldoni la kolekton de siaj fabeloj. Ĉu tio

efektive okazis, en kiu lingvo (esperante aŭ angle), kia estis titolo de tiu kolekto kaj ĝia enhavo, kiu estis la eldonisto—tio ĉi havas tre gravan signifon por objektiva verko pri Eroŝenko.

En 1908 aŭ 1909 Eroŝenko studis en Londona “Normal Royal College” por blinduloj, kaj en Muzika Akademio por blinduloj. Kiu Esperantistino klopodis pri akcepto de Eroŝenko en tiu Kolegio? kaj ĉu S-ro Merrick aŭ parencoj de ges-roj Blaise kaj Phillimore povus sendi siajn rememoraĵojn pri Eroŝenko?

Ĉiujn informojn pri Eroŝenko kaj liaj verkoj bonvolu sendi al mi ĉe Moskovskij pr. 196/3, kv. 1, Kharkov, 44, USSR. Al ĉiuj mi nepre respondos.

Antaŭdankante, *Iv. Bril.*

Estimata Sinjoro, — Rilate la recenzon de “Meteologia Terminaro” en la lasta numero de “BE”, estas mia opinio, ke vortoj, kiaj “ost” kaj “vest” aŭ “easto” kaj “ŭesto” havas nenium ajn lokon en Esperanto. Estas tute superfluaĉe havi iajn apartajn vortojn nur por uzado ĉe kompasoj, ĉar devas okazi, laŭ la baza karaktero de la lingvo, ke ili uziĝos aliloke analogie kaj ne abverbe, kaj tiam la formoj proponitaj povus kaŭzi malfeliĉan miskomprenon. Kial la kvarsilabeco de la vortoj donitaj al ni de Zamenhof “oriento” kaj “okcidento” estas tiom anatemeĉa?

Samideane via, *Brian Moon.*

De S-ro C. J. McMullen ni ricevis leteron protestantan kontraŭ troa lojaleco al Zamenhof. Ni komprenas, ke disciplino, eĉ en la lingva kampo, estas iom ĝena, sed ni ne povas disponigi multekostan spacon al malfekunda polemikado pri tio, ĉu Z. estis bona lingvisto.

JEB, tiel kruele frapita (p. 259), petas, ke oni korespondu provizore nur pri plej urĝaj aferoj.

Translation Competition 32

Kaj fine la ŝipo estis konstruita, kaj ili provis lanĉi ĝin laŭ la marbordo; sed ĝi estis tro peza por esti movata de ili, kaj ĝia kilo penetris profunden en la sablon. Tiam la herooj ĉiuj hontplene rigardis unuj la aliajn; sed Jasono parolis, kaj diris, "Ni petu la 'magian branĉon', eble ĝi povos helpi nin en nia bezono."

Tiam voĉo venis de la branĉo, kaj Jasono aŭdis tion, kion ĝi diris, kaj li diris al Orfeo, ke li ludu per la harpo, dum la herooj ĉirkaŭstaris tenantaj la pinajn rulilojn, pretaj por helpi ĝian iradon al la maro.

Tiam Orfeo prenis sian harpon, kaj komencis sian magian kanton: "Kiel dolĉe estas rajdi sur la ondokrestoj, kaj saltadi de ondo al ondo, dum kantas gaje la vento en la ŝnuraro, kaj la remiloj ekbrilas rapidmove inter la ŝaŭmo! Kiel dolĉe estas vagadi trans la oceano, kaj vidi novajn urbojn kaj mirindajn landojn, kaj hejmen veni ŝargita de trezoro, kaj gajni senmortan famon!"

Kaj la bona ŝipo *Argo* aŭdis lin, kaj sopiris al ekiro por forfloradi sur la maro; ĝis ĝi vibris tra tuta sia trabaro, kaj sin levis je la pruo ĝis la posta steveno; kaj eksaltis el la sablo sur la rulilojn kaj sin ĵetis antaŭen kiel brava ĉevalo; kaj la herooj provizis ĝian iradon per pintrunkoj, ĝis ĝi plonĝis en la sibletantan maron.

This piece produced several good entries, especially those of Mrs. M. Fraser and Mr. T. Fraser (Kircaldy), Mr. L. Leon (Manchester), Mr. D. Masterman (Oxford) and Mr. A. Wolstenholme (Stockport). Each had something to contribute towards an ideal translation. Mr. Masterman had the original idea of giving a metrical form to the song of Orpheus. The prize is awarded to Mr. G. Yoxon (Cymmau) and, resisting the temptation to present a mosaic, we give his text as received.

C. D. A. Capp.

47-a UNIVERSALA KONGRESO

Kopenhago—4-11 Aŭg., 1962

Loĝiga Servo. Pro bedaŭrinda preseraro la prezoj de la Loĝiga Servo, kiuj aperas en la Dua Oficiala Bulteno, *ne estas korektaj*. Bonvolu atenti, sekve, ke la ĝustaj prezoj estas la jenaj:

Kategorio A de 21 ĝis 35 n.gld. (kun banĉambro) (40-65 d.kr.).

Kategorio B de 13 ĝis 21 n.gld. (kun banĉambro) (25-40 d.kr.).

Kategorio C de 13 ĝis 21 n.gld. (sen banĉambro) (25-40 d.kr.).

Kategorio D de 9.50 ĝis 13 n.gld. (sen banĉambro) (18-25 d.kr.).

Kategorio E de 5.50 ĝis 9.50 n.gld. (sen banĉambro) (10-18 d.kr.).

Fervojoj Rabatoj. Kiel pli frue anoncite, la Dana Fervojo donas rabaton de 35% al kongresanoj aĉetantaj revenbileton.

Internacia Prelegsemajno. De la 11-a ĝis la 18-a de aŭgusto okazos en Frostavallen, Svedujo, Internacia Prelegsemajno. Detalajn informojn donas S-ro J. Strönne, Amiralsgatan 36, Malmö-C, Svedujo.

ISU. La ĝenerala temo de la ĉijara Internacia Somera Universitato estas: "La lingva problemo en la scienco".

Statistiko (ĝis fino de marto): Entute 943 el 34 landoj (111 el Britujo).

G. G. Pompilio, KKS.

Aktualajo. Okaze de la UK en Kopenhago vi povas senkoste ricevi la novan faldbroŝuron en Esp. pri la najbara sveda urbo Malmö. Skribu en Esp. al Malmö Turisttrafikförening, Malmö, Svedujo, kaj petu la Esperanto-eldonon.

Poezia Angulo

"Feliĉoserĉo"

Malfeliĉaj memorajoj, oni diras,
Nostalgiajn vundojn dolorigas. Pravon!
Neplueco faras el ni sian sklavon,
Kaj feliĉo ne plu ebla nin korŝiras.
La saĝulo pri ĉi-tio ja ne miras—
Tempopaso faris el li tempoavon.
Se naive temponepo serĉus savon,
Serĉus tiun celon, kiun mi sopiras,
Mi respondus: "Kia fantomeca mito!
Provi ĉasi memorajojn de l' spirito,
Revivigi vin en feliĉobsedo!
Vi jam scias, vi ne havas tian povon.
Por forgesi memoraĉojn, la rimedo:
Kreu novan—kreu novajn—kreu novon."

D. L. Masterman.

La Junularo Esperantista Brita

EK AL EKSTERLANDO?

Krom krokusoj kaj ŝafidetoj alportas la printempo ankaŭ amason da allogaj informiloj pri kunvenoj kaj kongresoj en- kaj ekster-landaj, okazontaj dum la venonta somero. El tiuj lastatempe alvenintaj mi ĉerpas kelkajn kiuj interesos ĉefe tiujn, kiuj sin sentas ankoraŭ junaj.

En **Ystad** (Svedujo) okazos de la 11-a ĝis la 18-a de aŭgusto 1962 la **18-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO**, kredeble la en la jaro plej grava renkontiĝo porjunula. Ystad situas en la orienta parto de Skåne, plej suda el la Svedaj provincoj, kaj estas urbo marborda enloĝata de proks. 13,000 homoj. La kongresanoj loĝos en novkonstruita banhotelo apud la sablostrando kaj la Baltiko, kaj ĝuos la tradiciajn kaj multe ŝatatajn programerojn de la IJK, interalie Amikiĝan Vesperon, ekskursiojn, Kongresan Balon kaj sportajn konkursojn. Krome okazos jar-kunveno de TEJO, esperanta Diservo kaj Oratora Konkurso.

Kotizoj (svedaj kronoj) por TEJO-anoj: 165 (ĝis 20 jaroj), 175 (20-25), 230 (post 25). Nemembroj pagos 5 kronojn pli. Antaŭ-kotizo: 80 kronoj. La kotizo enkalkulas veturon Malmö-Ystad. Peranto por Britujo: JEB, Grit Howe, South Park, Gerrards Cross, Bucks.

Por tiuj, kiuj ne povas atendi ĝis aŭgusto por iri eksterlanden ni rekomendas la **7-an Internacian Junular-Kunvenon** organizatan de Germana Esperanto Junularo (GEJ), de la 9-a ĝis la 16-a de junio ĉi-jare en **Oberkirch** kaj sur **Sohlberg** en la Nigra Arbaro. Tre allogaj estas ekskursoj tra la montaro, diskut-grupoj pri aktualaj temoj, amuzaj vesperoj kaj (pro registara subvencio) tre malaltaj kotizoj, sed la Kunveno celas esti precipe ferio-semajno por

tiuj, kiuj ŝatas bonan konversacion, amikan internacian kamaradaron kaj ravan pejzaĝon. Petu tuj aliĝilon kaj pliajn informojn de la Sekretariino de GEJ, F-ino Trude Dusterhaus, 509 Leverkusen 5, Schuberstr. 27, Germanujo.

De Pola Esperanto Junularo venas sciigo pri kunveno de ĉ. 10,000 geskoltoj en la urbo Bydgoszcz, de la 1-a ĝis la 4-a de junio, okaze de la Internacia Tago de Infano. Por montri al la gejunuloj la disvastecon kaj utilecon de la Internacia Lingvo, oni aranĝas ekspozicion de bildkartoj, kun salutoj en Esperanto, senditaj de esperantistoj el la tuta mondo, kiuj ricevos speciale eldonitan bildkarton kun teksto kaj filatela stampo en Esperanto. Se vi volas ricevi tian karton, kaj samtempe helpi la Informan Fakon de PEJ, skribu nun al: La Regiona Skolta Kunveno, Komonda Choragwi ZHP, Bydgoszcz Z, str. Dworeowa 56, Pollando.

Menciindaj ankaŭ kvankam mi ankoraŭ ne povas doni ĉiujn detalojn, estas du enlandaj renkontiĝoj de esperantistoj. En Dover okazos je Pentekosto Junular-renkontiĝo por dek-iom-jaruloj, kiuj povos gajni tie valorajn premiojn. Komencantoj estos speciale bonvenaj, kaj perfekta lingvoscio ne estos necesa por plene ĝui la aranĝon. Instigu do ĉiujn junajn gelernantojn skribi al la Regiona Sekretario de JEB, Colin Beckford, 5 Abbot's Walk, Caterham, Surrey, kiu sendos (anglalingvajn) detalojn.

La Komitato de JEB intencas aranĝi, plejeble dum septembro, renkontiĝon de la Regionaj Sekretarioj kaj aliaj oficuloj de la Junulara Sekcio, por pridiskuti detale la multajn organizajn kaj informajn problemojn kiuj evidentiĝis de post la starigo de la sistemo. Plenaj detaloj estos publikigitaj kiel eble plej baldaŭ.

Nekrologo

John Hartley

John Hartley estis inter miaj unuaj konatoj, kiam mi aniĝis al la loka grupo antaŭ dudek unu jaroj. Jack—kiel ni nomis lin—esperantiĝis nur kelkajn monatojn antaŭe, sed estis jam tre kapabla Esperantisto. Efektive, li estis stelo en grupo nombranta plurajn tre kompetentajn Esperantistojn.

Kaj, kompreneble, lia elstara talento kiel artisto estis de ni multe uzata kaj de li neniam rifuzita. Li streĉe laboris, ekzemple, por nia ekspozicio antaŭ du jaroj kaj senmezure kontribuis al ĝia sukceso.

Mi estis, do, pli ol ĝoja, kiam li konsentis kunlabori en la verkado de "Teach Yourself Esperanto"; kaj la brileco de la ilustraĵoj kaj la freŝeco de la aldonaj tekstoj (ĉiuj verkitaj sole de li) sendube difinis la prosperon de tiu verko. Ni jam antaŭlonge preparolis duan libron kaj eĉ faris kelkajn notojn, sed pro la premo de aliaj aferoj, ni devis lasi ĝin.

John Cresswell.

Morto

Kun granda bedaŭro ni anoncas:

La 5an de Aprilo mortis 75-jara **S-ro D. H. H. Searle**, membro de BEA ekde 1946 kaj dumviva membro de UEA. Li fondis la Grupon de Plymouth en 1903 kaj ĉestis la 1-an UK en Boulogne en 1905. Amikoj en la tuta mondo funebros lin.

En Marto mortis **F-ino A. M. Swan**, el Liverpool, membro de BEA ekde 1921. La Grupo en Blackburn, kie ŝi ĝis antaŭnelonge loĝis, multe sentos ŝian mankon.

La 5an de Majo mortis en aŭtomobila akcidento **Kerrin Masterman**, ĵusa sekretario de JEB, kaj juna Esperantisto je la sojlo de sia kariero. En la sama akcidento vundiĝis lia fianĉino, ties patrino, kaj Humphrey Tonkin. La esperanta movado en Britujo suferis gravan baton. Al la vunditoj ni deziras baldaŭnan resaniĝon.

Okazontaĵoj

Londono: Klubo—18 Majo, "La Rivero Mersey" (S-ino J. A. Wells); 25, "La Historio de Guildford" (kun kolorbildo) (S-ino F. W. White); 1 Jun., "UEA kaj Unesco" (S-ro H. Holmes, O.B.E.); 8, "Scienca Fikcio" (S-ro N. R. Smith, B.Sc.); 15, "Moskvo" (S-ro W. May).

Sutton: Klubo—23 Majo, "Viva Gazeto"; 30, "Parolado" (S-ro Fidler); 6 Jun., "Mensoga Vespere"; 13, "La Humanismo" (S-ro J. M. Garnett).

Nottingham: Klubo—17 Majo, "Kurioza Muziko" (S-ro L. Spinks) (College of Further Education, Canaan St., at 7.30); 14 Jun., Ekskurso.

Nord-orienta Federacio: La kvaronjara kunveno okazos en Friends' Meeting House, Front Street, Monkseaton (Whitley Bay) je 3.15 la 23an de Junio. Kutima tearanĝo.

Orienta Federacio: Venontaj konferencoj, 30 Jun., en Southend; 22 Sept., en Clacton.

Diservo: Bournemouth—3 Junio, en Friends' Meeting House, Avenue Road, je 3.30 (S-ro M. C. Butler, M.R.S.T.).

Federacio de Somerset kaj Gloucestershire. La jarkunveno de la federacio okazos je la 23a de Junio ĉe Western College, 1 Cotham Road, Cotham, Bristol 6, je la 3a ptm. akurate. La kotizo estas 6 ŝilingoj (inkluzive temanĝon kaj refreŝigaĵojn). Tiuj, kiuj ĉeestos nur la vesperan programon, devas pagi 3 ŝilingojn. Por rezervi temanĝon, bonvole sendu poŝtkarton al la sekretario, S-ro Philip Willey, 28, Clarence Avenue, Staple Hill, Bristol.

Federacio de Devon kaj Cornwall: La Jarkunveno okazos sabaton la 30an de Junio, ĉe Heavitree Social Centre, Wingfield Park, Exeter, je la 3a horo. Vizitantojn oni bonvenigos.

Krucvorteniĝmo : Solvo

Horizontale: 1. ekflam; spektr. 2. lir; panel; ora. 3. floret; kastor. 4. terebinto. 5. sid; nag; ans. 6. oni. 7. apika; adopt. 8. turisma. 9. sano; eta; rano. 10. klera; adres. 11. impona; ekonom; 12. arest. 13. tre; sekto; kio.

Vertikale: 1. elfo; la; skist. 2. kil; psalm. 3. froti; nepre. 4. redaktoro. 5. aper; aŭ; anas. 6. mateno; re; are. 7. bandito; ek. 8. sekiĝi; S.A.; est. 9. plan; am; akto. 10. standardo. 11. koton; arnik. 12. tro; paneo. 13. rara; at; osmio.

THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION, Inc.

OFFICIAL NOTICES

President: Miss E. M. Wheatley, L.L.A., F.B.E.A.

Hon. President: M. C. Butler, M.R.S.T.

Hon. Sec.: C. M. Houghton, B.Sc., A.R.C.S.

Hon. Treas.: R. W. Clark

Secretary: J. W. Leslie, F.B.E.A.

Registered: 140 Holland Park Avenue, London W.11. *Tel.:* PARK 7821

Hours: Monday to Friday, 9 a.m. to 5 p.m. (closed 1-2 p.m.); Saturdays, closed

NEW JUNIOR MEMBERS

Kalat, J. W. *Ohio, USA*
Shilling, R. *London, SE.2*

NEW MEMBERS

Carr, C. F. *Chandlers Ford, Hants*
Dunleavy, J. R. *Newtownabbey, N. Ireland*
Ford, S. G. *Little Chell, Staffs.*
Harris, N. W. *Teddington, Middx.*
Hart, G. *Aylestone, Leics.*
Holheimer, R. *Port Moresby, New Guinea*
Knight, T. *Morecambe, Lancs.*
Lawton, Miss A. *London, E.7*
Marsh, R. G. *Potters Bar, Middx.*
Martin, J. S. *Victoria, Australia*
Rickard, M. J. *London, NW.10*
Walker, Miss E. M. *Birmingham 17*

EXAMINATION RESULTS

ELEMENTARY EXAMINATION

By Correspondence

Cross, S-ino E. *Bexley*
*Walker, S-ino M. *Canterbury*

PRELIMINARY EXAMINATION FOR SCHOOLS

Brian Aves *Thomas Bennett School, Crawley*

ADVANCED EXAMINATION

Oral Part

†Bills, C. D. *Dartford*
‡Dixon, H. R. *Hastings, NZ*
Hume, F. S. *Auckland*
Moore, S-ino V. *Wanganui*
Morgan, R. V. *Palmerston, NZ*

DONATIONS TO GENERAL FUNDS

Previously acknowledged: £86 4s. 11d.
2s. 6d.: Miss F. J. Elliott. 3s. 6d.: J. D. Billany. 3s. 8d.: T. S. Aldworth. 5s.: J. W. Edwards, J. P. MacLean. 7s.: Mrs. A. Shaw. 10s.: W. W. Borrows. 20s.: N. Staffs Esperanto Group. 30s.: Miss M. H. Skeate. £5: Bristol Esperanto Society, H. Nicholls. Total to 18th April, 1962: £100 11s. 7d.

ADVERTISING FUND

Previously acknowledged: £16 0s. 6d.
5s.: W. W. Borrows. Total to 18th April, 1962: £16 5s. 6d.

"BE" SUPPORT FUND

Previously acknowledged: £15 15s. 8d.
10s.: W. W. Borrows. Total to 18th April, 1962: £16 5s. 8d.

LIBRARY RE-HOUSING APPEAL

Previously acknowledged: £33 1s. 1d.
3s.: A. D. Cook. 5s.: H. C. Allen. 10s.: E. R. Penny. 21s.: Eastern Esperanto Federation. Total to 18th April, 1962: £35 0s. 1d.

Written Part

†Bills, C. D. *Dartford*

* Denotes a candidate who has passed with Distinction.

† Denotes a candidate who, having passed the Written Part of the Advanced Examination with Distinction and the Oral Part, has been awarded the Advanced Diploma with Distinction.

‡ Denotes a candidate who, having passed both the Written Part and the Oral Part of the Advanced Examination, has been awarded the Advanced Diploma.

Korektoj: En "Litergrupa Enigmo" de Jan., demando 7, legu *juna*. (Dankon al enlanda kaj eksterlanda atentigintoj.) Sur p. 241 anst. *Turi* legu *Jiiri*.

Redaktoroj de Esperantaj gazetoj: Ni petas, rilate al la verkoj, "Bild-Libro pri Bestoj" kaj "Amuzo per Scienco", ke vi sendu ekzemplerojn de numeroj de viaj gazetoj en kiuj troviĝas recenzoj de tiuj verkoj al Associated Newspapers Ltd. (S-ro A. C. Crouch, Carmelite House, London E.C.4. Dankon.

SMALL ANNOUNCEMENTS

3d. per word. Minimum 3s. per issue. Prepaid

Copy must be received at the BEA Office by the 20th of the month

Sed la figarbo diris al ili: Ĉu mi perdis mian dolĉecon kaj miajn bonajn fruktojn, ke mi iru vagi super la arboj?

Ĵuĝistoj 9. 11.
"Scienca Revuo" (nova eldono el Jugoslavujo). Abono 12s. 6p.; kun membreco de Internacia Scienca Asocio Esperantista 17s. 6p. Anoncu vin ĉe la oficiala delegito John Rapley, 89 Mount Pleasant, Ruislip, Middlesex.

The Workers' Esperanto Movement associates world friendship with trade union, co-operative, and socialist principles. Details and magazine sent free: 27 Argyle Road, Ilford, Essex.

Scouts! Join the Scouts' Esperanto League. Enquire 42 Westbourne Street, Oldham, Lancs.

Deziras korespondi: S-ro Lu Chin-sheng, Nordokcidenta Kolegio de Agrikulturo, Wukung, Shensi, China.

Esperanto Grupo de Balham. Notu la novan adreson: 3 Dafforne Road, S.W.17 (apud Tooting Bec stacidomo). Kunvenoj okazas la unuan ĵaŭdon de ĉiu monato je la 20.00-a h. Ĉiuj interesatoj bonvenaj.

Helsingør: loko de la Antaŭkongreso 29/7-4/8 kun feriaj kursoj, prelegoj, distrado, kaj ekskursoj. La internacia Altlernejo estas la Antaŭkongresejo. Senpage sendos al vi nian programon kaj invitas vin plej

kore L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhoj, Danlando.

Railwaymen! Join the Brita Asocio de Esperantistaj Fervojoj. Details from C. Parry, 17, Kendal Avenue, Tynemouth, Northumberland.

Brita Esperanto-Humanistaro. Filiiginta al BEA. Membroj kaj interesatoj estas invitataj renkontiĝi ĉe Conway Hall, Red Lion Square, Londono W.C.1, ĉiumarde je la 18.30a h., antaŭ la kunsido de "Conway Discussions" (19.30a h.). Informoj pri BE-H haveblaj kontraŭ pm. de la Sek., S-ro George Dickinson, 21 Gribble Road, Liverpool 10. Programo de "Conway Discussions" havebla, kontraŭ pm., de F-ino Palmer, Conway Hall.

27-jara oficisto deziras korespondi kun sincera angla amiko aŭ amikino. Nikola Šustiĉ, "Viadukt", Goričan, Hrvatska, Jugoslavija.

15 gemembroj, 25- ĝis 60-jaraj, de la Uzina Esp-ista Rondeto, Liberec, Ĉeĥoslovakujo, deziras korespondadi kaj utiligi ricevitaĵojn por ekspozicio.

Amikeca servo. S-ro Mgr. Marian Lukaszczuraz (juristo), ul. Zeromskiego 16, Zielona Góra, Poland, deziras interŝanĝi neuzitajn poŝtmarkojn en kompletaj serioj laŭ Katalogo Zumstein aŭ Yvort, kun filatelistoj el ĉiuj landoj.

PLEASE HAND THIS TO A FRIEND WHO IS NOT YET A MEMBER

THE British Esperanto Association consists of men and women who believe that Esperanto is one of the important factors of modern progress; that by its aid international communication of every type is facilitated. Esperanto is intended not to replace the national tongues but, acting as a second language for people of all nations, to facilitate both written and spoken communications between them. **YOU** are invited to co-operate in spreading a knowledge of Esperanto by completing the following application for membership:—

SUBSCRIPTION: 30s. per annum. Persons joining after 1st July may pay 15s. to end of current year—those under 21 may join as Junior Members at half rates.

TO THE SECRETARY, THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (INC.),
140, HOLLAND PARK AVENUE, LONDON, W.11.

I,

herby apply for membership of THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (Inc.) and enclose the first Subscription of

Signature

Nationality Rank, Profession or Occupation

Address

Date Age (if under 21)

WE REQUIRE MORE SPACE

and to obtain this we have reduced the price of the post-war **Epoko Books** (Nos. 7-11) to the same as that of the pre-war ones, namely 2/- each volume, postage 5d.

Those still obtainable are:

3. **La Princo kaj Betty.** P. G. Wodehouse (G. Badash).
4. **La Tempo-Maŝino : Lando de la Blinduloj.** H. G. Wells (E. W. Amos).
5. **Princino de Marso.** E. Rice Burroughs (K. R. C. Sturmer).
6. **Colomba.** Prosper Merimée (J. Beau).
7. **Sep Vangofrapoj.** Karlo Aszlányi (L. Spierer).
9. **Brulanta Sekreto** kaj aliaj rakontoj. Stefan Zweig (K. & P. Schwerin).
10. **Kiso de la Reĝino.** I. F. Najivin (D. Staritsky).
11. **La Karnavalo kaj la Somnambulino.** K. L. Immermann (A. E. Wohlthat).

*All are good reading for the leisure hour and suitable gifts
for foreign correspondents*

Also reduced in price for the same reason:

ATAKOJ KONTRAŬ ĜARDENPLANTOJ

Dr. Paul Neergaard

This beautifully produced, useful, and interesting book is also an excellent volume to show to your non-Esperantist friends, particularly those interested in gardening.

Now only 12/6, postage 2/-

TROJLO KAJ KRESIDA

W. Shakespeare (S. A. Andrew)

Now 2/-, postage 4d.

We also announce that owing to steadily increasing costs the prices of **The Esperanto Teacher** and **A Practical Course in Esperanto** have been increased to 3/- each, post 4d.

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LIMITED

Order from

THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION

140 Holland Park Avenue, London W.11